FRANCA KATOLIKA ESPERANTISTO

LA HOUSSAYE EN BRIE
F - 77610 - FONTENAY TRESIGNY
FRANCE

★ Organo de FRANCA KATOLIKA ESPERANTO-ASOCIO, filio de I. K. U. E. ★

(Association Catholique Française pour l'Espéranto)

Prezidanto: S-ro R. Cl. COLAS 6, rue de Mézières 75006 - PARIS
Sekr.: S-ro R. DESPINEY 43, quai de Champagne 94170 - LE PERREUX sur MARNE
Kasistino: S-ino J. VINCENT B. P. 92 27700 - LES ANDELYS

C. C. P. Association Cath. Franç. pour l' Esperanto ROUEN 2324 93 N.

==== la n°: 2 F; abono: 8 F; kotizo: 2 F; sume: 10 F. ====

xxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxx

La materialon por la bulteno sendu al S-ino VINCENT antaŭ la 10-a de marto, junio, septembro kaj decembro.

xxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxx

---- N° 110 ---- BULLETIN TRIMESTRIEL ---- TRIMONATA BULTENO ----

==== Sankta PIO X-a, preĝu por ni. ====

----- NOVEMBRO 1976 -----

wwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwww

** SANKTA NOKTO **

Sankta nokto! Kia plaĉo
kuŝas en la dolĉa sono!
Estas, kvazaŭ l' infan - aĝo
vivus plu en ĉi - sezono.

Hela okul - bril' radia
sub abia lumo - pleno.
Tra la spaco ŝvebas dia
sento en mister - soleno.

En la krip' Sendit' al mondo
kuŝas povra, tamen riĉas.
Sur la vasta tero - rondo
homoj en l' anim' moliĝas.

Montras Li, ke l' vera beno
estas nek potenc', nek gloro,
sed, kiel en Bethlehemo,
simple varma homa koro.

Wilhelm Theodor Oeste

originale verkita en la germana la 17/12/1955
esperantigita la 25-an de novembro 1975.

wwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwwww

VENONTA KONSILIA KUNVENO.

Dimanĉon, la 5-an de decembro, je la 14.30, ĉe la UFE-sidejo
4 bis, rue de la Cerisaie 75004 - PARIS

Bonvenaj estas la membroj, kiuj deziras ĉeesti kiel simplaj observantoj.

PROTOKOLO DE LA SEPTEMBRA KONSILIA KUNVENO. (26/9/76)

Kiel kutime, tiu kunveno okazis en la UFE-sidejo kaj komenciĝis per preĝo.
Ĉeestis: S-toj BOURDON KAJ DEGRELLE, F-to MARMOU, S-inoj MICHAU kaj VINCENT, F-inoj PREUX kaj VANNEAU, S-roj BESSIERE, COLAS, DESPINEY kaj VILLENEUVE
Observantoj: S-roj BACHELIER (KELI) kaj BERNARD.
Senkulpigita: S-ro VERON, kiu daŭre flegas sian tre malsanan edzinon.

OKAZINTAĴOJ: sinsekve oni memorigas la somerajn kunvenojn.
Nia kongreso en Bourges: pro deficito de 92 F, oni decidas repagi tiun sumon al la organizinto, S-ro MORIN.
Diservo en La Grande Motte okaze de la landa kongreso: kuncelebris S-to Casanoves kaj S-ro Bachelier.
Okazis diservo en Ateno okaze de la UK.
Kongreso de KELI en Montpellier: partoprenis S-ino Vincent kaj F-to Marmou. Raportis S-ro Bachelier.
Spiritaj ekzercoj en Gostyn (Pollando): partoprenis S-to Degrelle.
Estrarkunveno de IKUE en Italujo: F-to Marmou legas la raporton de S-to Goudé.
Pilgrimado al la Virgulino de la Malriĉuloj en Banneux (Belgujo): organizis S-to Bourdon.
Ĉiun someran dimanĉon, diservoj en Baugé aŭ Vieil-Baugé aŭ Pontigné por la Grésillon-anoj.
Tiu longa listo montras la dinamikan aktivecon de niaj anoj.

EKEDE KONGRESO 1977: ĝi okazos je Pasko en La Houssaye-en-Brie de sabato vespere 9/4/77 ĝis lundo 11/4/77. La januara bulteno donos detalojn pri tiu grava kunveno.
NIA BULTENO: kvankam la lasta malfruiĝis pro la kialoj prezentitaj de nia redaktorino, tamen aperos kvara bulteno antaŭ la fino de l' jaro.

INFORMADO: nia ĝenerala sekretario, samtempe vicprezidanto de UFE respondeca pri informado, raportas montrante plurajn valorajn gazeteltranĉaĵojn.

KRISTANA INFORMILO: dum la jarkunveno en Bourges, oni decidis antaŭvidi informfolion kun partopreno de niaj protestantaj amikoj. Pro tio, oni starigis komisionon (S-ro Bachelier por KELI, S-ro Despiney por IKUE) por pristudi tekston kaj prezenton de tiu ekumena dokumento.

TRADUKADO DE RELIGIAJ KANTOJ: S-to Degrelle petis de S-ro Roger Bernard, sekretario de la Akademio de Esperanto kaj membro de nia asocio, esperantan tradukon de pluraj modernaj kantikoj. Oni ĝuis la freŝan novecon de kelkaj el ili. S-to Degrelle prizorgos la praktikan prezenton de tiu kantikaro.

LA AGADPLANO 1976-1977 povas esti resumita tiele:
- organizado de nia nacia kongreso 1977 en La Houssaye-en-Brie
- eldono de ekumena informilo
- eldono de kantiklibreto
- efektivigo de pluraj renkontoj pri kiuj prizorgas S-to Bourdon
- partopreno en IKUE-kongreso en Ĉenstoĥova (Pollando)
- partopreno en la agado de UFE kaj UEA.

La kunveno finiĝis je la 17.00.

Protokolis Roger DESPINEY.

++

" Li" kaj "Vi"

Kiu deziras iĝi apostolo ne preĝante, tiu poste ne plu evangelizos.
Li ne nur forgesas restreĉi siajn spiriton kaj koron; li enprofundiĝas en hipokritecon. Kiel li povus elvoki, kiel vivantan, tiun, kiun li opinias ĉeestanta en la mondo, sed kiun li mem neniam alparolas? Kiu diras pri Dio "Li", neniam dirante al Li "Vi", tiu estas forgesanta la trajtojn de la Dia vizaĝo.

Baldaŭ Dio estos por li nur ideo kaj poste nur vorto, ĉar ĉe la komenco kuŝas logiko-eraro: oni ne bone parolas pri iu Dio, kiun oni ne aŭskultas aŭ alparolas. Unu el la gravaj instruoj de Pastro de Foucauld estas la jena: Li neniam parolas pri Dio, Li ĉiam parolas al Dio. La kulmino de la Jesua revelacio

.../...

estas la pastra preĝo, en kiu Jesuo prenas nin, kiel atestantojn de sia dialogo kun la Patro.

Paul GUILLUY

§§§

ESPERANTO-KURSOJ GVIDATAJ DE NIAJ MEMBROJ.

LE PERREUX: kurso okazas en la kadro de la lerneja programo en privata lernejo katolika "Ecole privée St-Joseph". La estro mem, S-ro SEVIN, instruas 29 geknabojn (18 knaboj + 11 knabinoj) 8/11-jarajn per la metodo de S-ro Korte "Sub la Verda Standardo".
S-ro DESPINEY gvidas apartan kurson por unu instruistino de tiu lernejo, tiel firmigante la estonton.

LES ANDELYS: en la junuldomo, vendrede de la 17.30 ĝis la 18.30, S-ino VINCENT gvidas duagradan kurson por 4 sinjorinoj per la Naturmetodo de S-ro Friis.

PERPIGNAN: en la kvartalo "Moulin à Vent", S-ro AMOUROUX instruas 7 gelernantojn jam la duan jaron.

VIEIL-BAUGE: en la katolika lernejo, F-tino MARIE instruas la IL al la geknaboj de CE 2.

YVETOT: en la junuldomo, S-ro POTTIER gvidas du kursojn:
unuagradan lunde de la 18.00 ĝis la 19.30 per la Junulkurso
duagradan vendrede samhore per la libro "Por la Praktikantoj".

Se vi gvidas kurson, ĉu publikan, ĉu lernejan, ĉu perkorespondan, nepre informu la redaktorinon (S-ino J. Vincent B.P. 92 27700-LES ANDELYS)

§§§

PACON PER AMO SUR LA TERO.

La homaro disŝirita per kverelo kaj malpaco,
Petegis al Dio jam longan tempon:
Donu la pacon al ni sur la tero.

La Dieco aŭdis la sopiron de la homaro,
Ĝi favore aŭskultis la sopiron por paco:
Kaj promesis la pacon sur la tero.

En sankta nokto la Jesuinfano proklamis,
Al ĉiu, bonan volon havanta:
Pacon per amo al la homaro sur la tero.

Dio venis en malriĉeco kaj mizero,
La paŝtistoj donis panon al la Infano Dieca:
Kiu donas al ili pacon per amo sur la tero.

La saĝuloj de la mondo, gvidataj de la stelo,
Al tiu venis kaj preĝis, kiu sole estas honorinda:
Kiu al ĉiuj donas pacon per amo sur la tero.

Post tridek jaroj en korpo de homo,
Dio per la Spirito la Filon konsekris:
Por doni pacon per amo al la tero.

Paco sur la tero estas rekompenco por ĉiuj,
Kiuj interligas sin mem kun la Filo de Dio:
En Kredado, en Esperado, en Amado.

La Savanto, naskita por ni en Bethlehemo,
Por nia kulpo al la kruco en Jerusalemo:
Helpu ankaŭ vi al Li porti la krucon.

Heinz WILLECKE

Obermarsberg (Germanujo)

* * * *

BELEGA VIZITO AL GREKLANDO.

Dum la unua samajno de aŭgusto okazis en Ateno, ĉefurbo de Greklando, la 61-a Universala Kongreso de UEA, kiun mi partoprenis.

Post aŭtomobila veturado tra Italujo ĝis Brindisi, ni vojaĝis per la ŝipo ĝis Patras. Poste ni reveturis ĝis Ateno: 300 km, la vojo estis belega en paradiza pejzaĝo!

La kongreso okazis en fama altlernejo de Ateno: "Pantios". La kongresanoj nombriĝis ĉirkaŭ 1300. Mi povis partopreni en interesaj konferencoj pri lingvistiko.

Okazis ankaŭ kunsidoj de la diversaj asocioj kaj de UEA.

La teatra prezentado montris faman teatraĵon de Molière "La lernejo de la virinoj" ludita de la Bulgara Esperanto Teatro. La publiko pli malpli aprezis la ludadon de la aktoroj, sed neniu restis indiferenta: jen estas la ĉefa afero!

La kongresa balo okazis en grandega salono ĉe la hotelo Hilton kun moderna kaj greka muziko. Ĉiuj bone amuziĝis!

Alian tagon bela prezentado de folkloraj baledoj de Dora Stratou ravis nin per la buntaj kostumoj kaj lerteco de la gedancistoj.

Ekskursoj al Delfo kaj insuletoj apud Ateno estis proponitaj al la kongresanoj.

Post bona laboro kaj ĝuindaj distraĵoj, la atena kongreso finiĝis per la solena fermo en Hilton.

Persone mi eĉ ĝuis plian ĝojon: 12-taga restado sur insulo Kritio. Ĝi ege plaĉis al mi, ĉefe Knossos kaj la palmarbaro de Vaï.

Ĝis Rejkaviko, kie okazos la 62-a UK de UEA en 1977!

BONNET Sylvie.

xxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxx

ITALOJ EN BABELO.

Italaj arkeologoj rekondukos al la lumo la antikvan Babelon, la urbon, kiu antaŭ 2500 jaroj estis regata de la potenca Nabukodonosor kaj estis la plej vasta kaj luksa en la tiama mondo. Laŭ multaj historiistoj, Babelo ankaŭ estis la plej granda fortresa urbo iam ajn konstruita de la homoj.

Do, Italoj elfosadas en Babelo. Profesoro Giorgio GULLINI, la estro de Esplora Centro starigita antaŭ 15 jaroj en Torino, klarigis, ke la plenumo de la tasko postulos la laboron de unu tuta generacio. "Nur post 10 jaroj, li deklaris- ni kapablos liveri bazan konon de Babelo; alia jardeko estos necesa por komplete elfosi la restaĵojn, tiel komprenigante la rolon de ĉi tiu urbo, kaj eksciante detalojn, kiuj ĝis nun restis kaŝitaj subtere."

Sed kio estas la Torina Esplorcentro kaj kiujn meritojn ĝi havas, por ke oni konfidu al ĝi ĉi tiun gravan taskon? La Centro akiris internacian famon per la seriozeco kaj la rigoro de siaj ĝisnunaj studoj. Jam ekde 1962 ĝi agadas en Irako, plenumante elstarajn esplorojn, ekz. la elfosadojn de Seleukia, la urbo, kiu heredis la potencon de Babelo (en Seleukia, interalie, la italaj arkeologoj retrovis unu el la plej grandaj bibliotekoj/arkivoj de tiu periodo). Nuntempe, la Centro estas restaŭranta, laŭ komisio de la iraka ŝtato, la kliniĝantan minareton de Mossul, altvaloran islaman monumenton. La Italoj merite gajnis famon de arkeologoj zorgaj, skrupulaj kaj kleraj; krome, ili koncentris siajn esplorojn sur historian periodon, kiu kutime estas neglektata de aliaj sciencistoj, nome sur la periodon, kiu iras de la falo de Babelo ĝis la alveno de la Romianoj. La nunaj studoj celas ĝuste ekzameni, kiel diversaj civilizoj (asira, babela, persa, irana, helena, romia, islama) reciproke integriĝis dum jarcentoj.

Teksto de FUCILE, traduko de Antonio de SALVO.

xxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxx

ESPERANTO EN LA RADIO.

Al la listo de la stacioj, kiuj elsendas en la Internacia Lingvo, listo, kiu regule aperas en la Esperanto gazetaro, oni devas nun aldoni Radio-Vaticana, kiu unuafoje direktis Esperanto-elsendon al la mondo la 17-a de aprilo. La mallongan programon oni povas aŭskulti regule ĉiudimanĉe je la 23.30 laŭ

.../...

ondolongo 196 m, en la kadro de la elsendo "Kun vi dum la nokto".

La itala sekcio, kiu kunlaboras kun la Vatikana Radio sur la esperanta kampo, petas viajn informojn pri bona aŭskultado, viajn dezirojn kaj sugestojn pri ĉi tiu programo.

Skribu al Radio Vaticana 00120 Città del Vaticano ROMA ITALUJO

++

LINGVA ANGULO.

Sendube pro la malfrua apero de la nº 109, venis nur 4 respondoj de S-roj BOURGOIS (B), DAUCHEZ (D), GUILLON (G) kaj S-ino MICHAU (M).

1) se dépenser: penadi, klopodegi (B); pene klopodi, foruzi siajn fortojn (D); aktivege agi (G); senrezerve sindoni (M).

2) déshabiller du regard: mense nudigi, mense senvestigi (B); imagi iun nuda (D); atenti ĉiun detalon (G); esplore elrigardi (M).

3) avoir le dessus: superi (B, D); finvenki (B, G); venki (D); venke superi (M).

4) avoir des dettes criardes: fronti neprokrasteblajn ŝuldojn, esti urĝigata pro siaj ŝuldoj (B); esti malkaŝe persekutita, famkonata nepagantо (D); ŝuldi altajn sumojn (G); havi nekaŝeblajn ŝuldojn (M).

5) discuter le bout de gras: interbabili pri ĉi tio kaj tio (B); diskuti pri bagatelaĵoj (D); longe priparoli aferon (G); refuti pri senavantaĝo (M).

6) ils sont comme les deux doigts de la main: ambaŭ estas nedisigeblaj (B); ili interkonsentas kvazaŭ du fingroj de la mano (D); ili estas tiel unuigitaj, ke ili neniam disiĝas (G); kunigitaj kvazaŭ manfingroj (M).

7) un dialogue de sourds: dialogo inter surduloj (B); dialogo inter homoj rifuzantaj aŭskulti (D); vana dialogo (G); senelirebla diskuto, fanatikula dialogo (M)

8) c' est un dictionnaire ambulant: li, ŝi estas migra vortaro (B); li estas scioplena (D); ĉion li kapablas klarigi (G); vivanta vortprovizo, memorriĉa pri vortaro (M).

9) se dilater la rate: tordiĝe ridi (B); bonkore ridi (D); multe amuziĝi (G); ridegi ĝissate (M).

10) faire diligence: akceli, urĝigi (B); rapidi (D); agi tiel rapide, kiel eble (G); diligente ekiri, ekagi (M).

Jen la definitiva klasifiko por la jaro 1976:
1) S-ino MICHAU (26); 2) S-ro BOURGOIS (19); 3) S-ro DAUCHEZ (12); 4) S-ro GUILLON (8); 5) S-ro DE SALVO (4).

Sinceran gratulon al ĉiuj partoprenintoj, ĉefe al S-ino Michau, kiu montriĝis la plej lerta tradukistino.

Laŭ la regularo aperinta en FKE nº 107 p. 7, S-ino Michau gajnas premion en valoro de 50 F; S-ro Bourgois premion en valoro de 25 F kaj S-ro Dauchez premion en valoro de 10 F.

La tri laŭreatoj bonvolu skribi pri siaj deziroj: ĉu abono, ĉu libro(j), ĉu simple kreditkarto al la redaktorino.

Nova konkurso komenciĝos en la januara nº kun la jenaj proponoj de S-ro Bourgois: 1) être le dindon de la farce; 2) en dire de vertes et de pas mûres; 3) je vais lui dire ses 4 vérités; 4) il en dit de belles; 5) elle a des doigts de fée; 6) il a toujours le doigt sur la gâchette; 7) il me doit une fière chandelle; 8) donnant-donnant; 9) je vous le donne en mille; 10) j' en donnerais ma tête à couper.

Ni e speras pli multnombran partoprenon en la tradukado. Tio ja estas amuza maniero perfektiĝi en Esperanto kaj akiri pli internacian stilon. Faru TUJ! Morgaŭ vi forgesos!

* * * *

VEGETARAJ BRAZILAJ RECEPTOJ.

I. SKAROLO EN TAVOLO. Apartigu la foliojn de la trunketoj; kuiru la foliojn en salita akvo, elfluigu la akvon, batu per tranĉilo kaj fritu kun spicaĵoj. Miksu kun kremo farita el 1/2 l da lakto, 1 supkulero da butero, 2 supkuleroj da raspita fromaĝo, 2 ovoflavoj, salo, 2 supkuleroj da faruno. Tranĉu la trunketojn en pecetoj, kuiru ilin en salita akvo, elfluigu la akvon, fritu en oleo, metu sur teleron, kovru per rondaĵoj el tomatoj; sur la tomatoj metu tranĉaĵojn el fromaĝo; rompu ovon sur fromaĝo, batu ĝis la fromaĝo fandiĝos kaj kuiru la ovojn. Ĉirkaŭe verŝu la kremon.

II. BIFSTEKO EL BLITOFOLIOJ. Boligu blitofoliojn, elfluigu la akvon, aldonu petroselon, ŝenoprazon, ajlon pistitan kun salo, bone batu per tranĉilo, aldonu ovon, sufiĉe da faruno por kunligi. Prenu paton kaj faru kvazaŭ krespojn. Oni povas fari saŭcon per cepoj kaj tomatoj aŭ friti la bifstekojn trempinte ilin en kirlitaj ovoj. Oni povas uzi aliajn vegetaĵojn: spinacon, skarolon.

III. BRASIKO LA% LA BAIA MANIERO. En oleo, fritu cepojn kaj distranĉitajn tomatojn kun spicaĵoj. Kiam la tomatoj dispeciĝis, aldonu paston el tomatoj, brasikoj jam kuiritaj kaj distranĉitaj. Fritu 20 mn. Anstataŭ ol tomatoj aŭ pasto, oni povas densigi per manioko. Anstataŭ brasikon, oni povas uzi sinapon.

Nun, bonan apetiton!!

??

NIA MEMBRARO. Novaj membroj 1976: 7) S-ro GANGLOFF (Bas-Rhin)
Membroj bonfarantoj 1977: 1) S-ro BESSIERE (I & V)

??

NOTO DE LA KASISTINO. La nunaj poŝtaj tarifoj estas tre peza ŝarĝo por la asocioj, kiel la nia, vivantaj nur per la kotizoj de siaj anoj. Sekve, ju pli frue vi pagas tiun kotizon, despli facile mi mastrumas la kontojn. Estas vere superflua elspezo la sendado de rebatleteroj al la malfruiĝantoj aŭ forgesintoj. Se vi ne plu deziras ricevi nian bulteno, simple sciigu tion al mi per poŝtkarto. Same senutila elspezo estas presado kaj sendado de bulteno al tiuj, kiuj ne plu interesiĝas pri la agado de FKEA. Se vi estas tre forgesema aŭ distriĝema, fariĝu TUJ dumviva membro: kostas nur 200 F (malpli ol paro da ŝuoj!) kaj vi povos vivi poste tute senzorge.
Atente kontrolu ĉu via kotizado estas ĝisdata: kelkaj anoj ŝuldas 1976 kaj 76!

??

KOTIZTABELO 1977

IKUE kun "Espero Katolika". . . . . 30 F

Nepre pagu al la peranto R. Degrelle c.c.p. NANCY 714 95 P.

* * *

ACFE kun "Franca Katolika Esperantisto" . . . . . 10 F
(infanoj malpli ol 16-jaraj, sacerdotoj, religiul(in)oj . . . . . 5 F
Membro bonfaranto . . . . . 50 F
Dumviva membro . . . . . 200 F

U.F.E. kun "Revue Française" . . . . . 70 F
U.E.A. kun Jarlibro kaj "Esperanto" . . . . . 92 F

Association cath. franç. pour l' Esperanto c.c.p. ROUEN 2324 93 N.

Abono al "Biblia Revuo" . . . . . 30 F

Peranto: G. Baudry c.c.p. LILLE 4704 43.

++

Dépôt légal: 4ème trimestre 1976 /// Polycopié par: F. M. C.
Papier de presse nº 34 745 /// Prieuré St-Martin
Directeur-gérant: Gaston Véron /// LA HOUSSAYE EN BRIE
77610 - FONTENAY TRESIGNY FRANCE

++